Numero: 308.
Januaro 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO
Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŜVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tubolv

Esperanto estas lerninda lingvo?

Esperanto estis kreita por helpi en la komunikado inter diverslingvaj homoj. Dum ĝia ekzisto ĝi jam pruvis milfoje sian vivkapablon, kvankam oni atakis ĝin.

Mi ne komprenas, kio estas la peko de la Zamenhofa lingvo. Ĝi ne deziras subpremi naciajn lingvojn kaj kultuojn.

Esperanto estas paca lingvo.

Se ĝi disvastiĝus sur la terglobo, ĝi plifaciligus la homan kontakton. Paralele kun la naciaj lingvoj ĝi donus al ni pli bonan vivon.

Se oni ellernas Esperanton, tio ĉi ankoraŭ ne signifas, ke oni ne povas lerni aliajn fremdajn lingvojn.

Estas pruvite, kiu bone ellernas Esperanton, tiu povas ellerni pli facile kaj pli rapide aliajn lingvojn.

Ĝi donas lingvan bazon al la lernanto. Multajn homojn malkuraĝigas la fiasko de iu fremda lingvo, kiun oni devas lerni plurajn jarojn. Malgraŭ tio fine oni ne, aŭ apenaŭ povas ellerni ĝin.

Estus necese internacia lingvo por la homaro per kiu oni povus komuniki ie ajn en la mondo.

Krome Esperanto defendas la naciajn lingvojn de diversaj influoj.

Mi ne scias, ĉu mi nur sentas, ke la troa uzado de la angla lingvo kripligas ĝin. La angla lingvo havas diversajn dialektojn tra la tuta terglobo. Onidire ofte usonanoj ne komprenas la anglojn.

Mi ne estas la malamiko de la angla lingvo. Ĉiuj naciaj lingvoj estas valoraj kaj lernindaj. Bone, se oni ellernas iun nacian lingvon. Ili helpas ekkoni la kulturon, kutimojn unu de la alia.

Mi ŝatus, se Esperanto okupus sian indan lokon inter la lingvoj. Ĉiu scias, Esperanto ne estas miraklo. Sola ĝi ne estas kapabla solvi la tutan problemon de la mondo.

Jes, lerni Esperanton estas inde. Mi esperas, ankaŭ en la nova jaro ĝi havos novajn adeptojn kaj la malnovaj restos.

En ĉiuj landoj de la terglobo oni lernos kaj parolos ĝin. Esperanto vivos pace kun la aliaj lingvoj kaj fine ankaŭ la malamikoj de la Zamenhofa lingvo komprenos, ĝi ne estos kontraŭ, sed kun la aliaj lingvoj.

— Redaktanto —

Sonĝo

Nokte mi havis strangan sonĝon. Matene vekiĝante mi ne volis malfermi miajn okulojn. La sonĝo estis belega.

Mi sonĝis, en la mondo ĉiuj homoj parolis Esperanton. En la stacidomoj kie ajn sur la terglobo mi povis peti vojaĝbileton en tiu ĉi lingvo. La homoj komprenis min.

Mi ne havis lingvajn malfacilaĵojn. La landoj kaj kontinentoj verdiĝis.

En la lernejoj la lernantoj ne devis lerni longajn jarojn iun mondlingvon. La infanoj jam tute frue ellernis Esperanton kaj ĝi estis memkomprenebla, ke oni parolas en tiu ĉi helplingvo.

Por ili restis ankaŭ la gepatra lingvo. Ili ne devis timi, ke iu granda lingvo subpremas ĝin

La homoj kaj nacioj vivis pace unu kun la alia. Esperanto helpis disvastigi kulturon, literaturon. Ĝi fariĝis la dua gepatra lingvo de la homaro.

Tial estis malfacile vekiĝi matene. Mi denove estas en nia reala vivo, kie ĉio estas alia.

Se vi vojaĝas eksterlanden, tiam vi ne povas komprenigi vin kun la lokanoj. Vi lernas fremdajn lingvojn. Malgraŭ tio estas landoj, kie vi povas uzi neniun lingvon lernitan.

Jarojn vi pasigas lernante grandajn mondlingvojn esperante, se vi ellernos la plej grandajn, tiam oni komprenos vin ĉie en la mondo.

Esperanto povus plifaciligi la homan komunikadon kaj antaŭ vi malfermiĝus la mondo.

Bedaŭrinde mia sonĝo forflugis kun la matena venteto. Mi ŝaltas radioaparaton kaj mi aŭdas agrabla virina voĉo instigas la aŭskultantojn lerni fremdajn lingvojn per speciala, efika metodo. Eĉ ankaŭ la virina voĉo garantias, se oni elektas tiun ĉi metodon oni garantias, ke post kelkaj monatoj aŭ duonjaro vi ellernos la elektitan lingvon.

Se ĝi vere estus tiom bonega metodo, tiam sur la terglobo jam ne ekzistus lingvaj malfacilaĵoj. Ĉiuj homoj parolus mondlingvojn.

Ni nur sonĝadas pri facila kaj efika lingvolernado, dume la jaroj forflugas super nia kapo. Ni ne komprenas nian homfratojn, kiuj parolas iun alian fremdan lingvon.

Alvenis la tempo fari ion por ke en la sekvaj jaroj, jardekoj ni ne droniĝu en la maron de la lingvoj.

Mi havis belegan sonĝon. Sed ĝi estis nur sonĝo. Ne sufiĉas sonĝi, se doni devas agi por ke nia mondo ŝanĝiĝu.

Se ni agos, tiam eble ankaŭ niaj sonĝoj realiĝos.

— Ŝaŝa —

Amo neniam forpasas

Paŭlo estis nur dekjara, kiam li renkontis Saran. Ŝi estis pli aĝa, ol li almenaŭ kvar jarojn.

Li iris sur la strato helpante al sia panjo. Ili estis en la proksima grandmagazeno. Ili aĉetis necesajn aĵojn por la ĉiutaga vivo.

Ili jam iris hejmen. Dum la tuta vojo lia patrino parolis al li. Paŭlo jam ne aŭdis, kion. Ĉe stratangulo li neatendite ekvidis la knabinon. Ŝi estis belega kaj preskaŭ plenkreska. Ŝiaj okuloj brilis, kiel diamantoj.

La koro de Paŭlo ekpulsis, kiam iliaj okuloj renkontiĝis. La knabino ekridetis. Unue Paŭlo ne komprenis tiu ĉi rideto al kiu direktiĝas. Nur kiam jam li iris malproksime li komprenis, Sara ridetis al li.

Tiam li sentis, tuj li devas returni sin kaj kuri, kuregi post la knabinon.

Li estis malkuraĝa. Paŭlo ne povis forlasi sian panjon. Kion diri al ŝi? Kiel li klarigu, ke nun li forlasas ŝin kaj ne helpas hejmenporti la retosakon da aĉetitaj aĵoj.

Li iris malgaje kaj ekscitite. En ĉiu momento li rerigardis. Lia panjo cinike rimarkis:

— Kial vi returnas vin konstante? Ĉu vi atendas iun?

— Ne panjo – li respondis iomete embarase. – Mi nur rerigardadas. – kaj subite li diris – Ĉu hejmenveninte vi permesos, ke mi iru al mia amiko por ludi?

La virino mire diris:

— Ja vi promesis purigi la ĉambron.

— Jes, mi promesis – balbutis triste Paŭlo.

Li restis hejme. Dum la tuta tago li suspiradis kaj li revadis pri Sara.

Li apenaŭ konis la knabinon. Ŝi translokiĝis al la urbo antaŭ nelonge. Ili loĝis malproksime en alia strato.

Ekde tiu ĉi renkonto Paŭlo ĉiam serĉis la okazon por vidi ŝin.

Bedaŭrinde ĝi okazis tre malofte. Tiam li ĉiam estis ekscitita kaj ne kuraĝis komenci babiladon kun ŝi. Ili nur ridetis unu al la alia.

Nokte Paŭlo ofte sonĝis pri ŝi. Vekiĝante li ĉiufoje estis malgaja, eĉ lia piĵamo estis tute humida pro la ŝvito.

Li tre esperis, ke en iu tago alvenos la bonega momento kaj li povos konfesi al ŝara, kiom li amas ŝin.

Dume la monatoj, jaroj flugis super ilia kapo.

Paŭlo devis lerni. La gepatroj estis ege severaj. Lia patro deziris, ankaŭ sia fileto estu kuracisto, kiel li.

Ofte pasis monatoj, ke Paŭlo apenaŭ vidis la knabinon. Kvankam ŝi daŭrigis la studadon en la mezlernejo de la urbo.

Ankaŭ post jaroj la koro de Paŭlo ekpulsis tiom pasie, kiel dum la unua renkonto.

Paŭlo abiturientiĝinte daŭris la studadon en universitato. Li studis medicinon. Li apenaŭ vidis Saran jarojn. Li sciis pri ŝi nenion. Malgajiga novaĵo estis, kiam dum la somera ferio li vidis ŝin kun alta, blondulo.

Li rifuĝis al la urbo, kie li studis en universito.

Falis la mondo. Komence, eĉ li ploris. Li decidis sinmortiĝi. La bonŝanco savis lian vivon. Paŭlo hazarde konatiĝis kun ĉarma kolegino, kiam jam li laboris en hospitalo.

Ŝajnis, ke li forgesis Saran. Nur malofte pensis pri la iama knabino. Tiam lia koro doloris lin iomete, sed la ĉarma kolegino ĉiam gajigis lin.

Fine Paŭlo edzinigis ŝin kaj feliĉe vivis en malgranda urbo. La edzino de Paŭlo naskis tri belajn infanojn por li.

Post multaj jaroj, eĉ jardekoj, kiam la patrino de Paŭlo mortis, li hejmenvojaĝis. Elaŭtomobiliĝante sur la strato li renkontis maljunulinon ege similante al Sara. Preterirante unu apud la alia ili denove ekridetis.

— Apáti Kovács Béla —

Poezio

Ĉu vi legas ĉiutage versojn? La nunan homon ne tro interesas la poezio. Ili prefere rigardas filmojn aŭ interretumas. La verslegado iĝis ne interesa kaj valora okupo.

Laŭ mi tiu ĉi estas tre malbona vidpunkto. La legado de poemoj povas doni plezurojn.

Do, legu ĉiutage versojn kaj, se vi estas sufiĉe skribu viajn pensojn en ĝi!

La nokto, la silento

Mi ŝategas la nokton, la silenton,
kiel ermito, kiu admiras groton
kaj muzikon de la naturo.
Sed mi ne havas kialon
por malami la taglumon –
la dunaskiton de la nokto.

Kiam venas la nokto, la silento,
mi trovas trankvilan tempon,
mi estas vera noktogardo
kun plumo en la mano
por skribi el mia koro
Viajn vortojn, Sinjoro.

Verkis:

Yohanes Manhitu

Nur Unu Lingvo

Kelkfoje mi provas min meti
en la malnovaj ŝuoj de avino,
kiu parolas nur enlandan lingvon
kaj simplan parolmanieron,
por bone kompreni ŝin
kaj ŝian propran mondon,
kiu ŝajnas mistero al mi.
Oni timas ke estus malfacila tie,
en tiu vera monolingva mondo,
ĉar ni uzus tro malmultajn vortojn
por akurate priskribi oceanon de ideoj.
Eble ni vivas en la amaso de lingvoj
tiel ni ne povas ekvidi la feliĉon
de vivi monolingve sub la ĉielo.
Nun mi estas en mondo de Babel
kun lingvaj brikoj ĉirkaŭ mi.
Iuj estas fortaj, iuj estas malfortaj.
Bonŝancaj brikoj por reĝa palaco
havas gloron, prestiĝon kaj benon.
Sed nura peco en la mano de avino
bezonas amon de nova generacio.
Kvankam ni havas fortajn brikojn
por libere konstrui novajn turojn
kaj konstruaĵojn en la tuta tero,
simpla enlanda lingvo de avino,
malgraŭ ĝiaj evidentaj limoj,
bezonas zorgon por postvivi
en la mondo de lingva kuro,
kiu fariĝas pli kaj pli forta.

Jogjakarto, Indonezio, 16/III/2007

Verkis: Yohanes Manhitu

Por infanoj

La kokino de malriĉulino

Kaj estis, kaj ne estis en vilaĝo vivis malgranda kokino. Ĝi estis la unusola kortobirdo de malriĉa virino.

Ŝi estis tiom malriĉa, ke ofte tagojn ŝi ne manĝis. Pro tio la virino suferis multe.

En iu tago la kokino diris al sia dommastrino:

— Kara dommastrino mia, forvendu min en la sekva foiro. Per la riĉevita mono aĉetu nutraĵon por vi.

La virino ne volis forvendi sian karan kokinon, sed ĝi fine konvinkis ŝin.

— Mia koro doloras min, se mi forvendos vin, mia kara kokino – diris la virino kaj ŝi ekploris.

— Ne ploru pro mi, kara dommastrino – konsolis la virinon la kokino.

Post kelkaj tagoj estis semajna foiro en la proksima urbo. La virino tien portis la kokinon por forvendi.

Ŝi jam frumatene alvenis, sed neniu deziris aĉeti la kokinon.

Tagmeze la virino malgaje diris:

— Mi ne povas forvendi vin, mia kara kokino. Ni iru hejmen!

— Restu ankoraŭ kvaronhoron!

La virino aŭskultis je sia kokino kaj ili ankoraŭ restis en la foiro.

Jam ĉiu preparĝis por hejmeniri, kiam alvenis la reĝo. La homoj miris, ĉar li neniam kutimis viziti la foiron.

La reĝo promenadis inter la vendistoj kaj li rigardis ĉion. Fine li alvenis al la virino kaj li demandis scivole:

— Kiom kostas tiu ĉi kokino?

La kortobirdo tuj flustris al sia dommastrino:

— Diru al la reĝo, cent orojn.

Dio scias, kial, la virino elbuŝigis:

— Mia reĝa Moŝto ĝi kostas cent orojn.

La reĝo ege ekmiris aŭdante ĉi tiun altan prezon.

— Laŭ mi, tiu ĉi prezo estas tro alta por unu kokino. Kial ĝi estas tiom multekosta?

— Diru al li, ke mi estas mirakla kokino – flustris denove la kokino.

La virino timis, se ĝi mensogos tion ĉi, kaj ĝi ne estas vera, la reĝo senkapigos ŝin.

— Kial ĝi estas mirakla kokino?

— Diru, mi povas aŭguri – proponis a kokino.

— Kiel vi povus aŭguri? Vi estas simpla vilaĝa kokino – dubis la virino.

— Nun ne faru problemon pro tio! Diru tuj!

La virino timeme diris:

— Mia reĝa Moŝto, mia kokino povas aŭguri.

— Via kokino vekis mian interesiĝon. Mi aĉetas ĝin. Jen cent orojn por ĝi. Sed atentu, se vi trompas min, vi estos senkapigita. Kun la kokino ankaŭ vi venos kun mi al la fortikaĵo.

Nun jam efektive tremis la virino pro la timego. Dum la vojo ŝi adiaŭis de sia vivo. Baldaŭe la reĝo ekscios, ke ŝi trompis lin.

Posttagmeze okazis nenio. Sed vespere dum la vespermanĝo la reĝo invitis grandsinjorojn por prezenti la aŭgurantan kokinon.

— Nu, kokino, pruvu vian sciencon! Kio okazos morgaŭ?

— Kara reĝa Moŝto – komencis la kokino – inter la grandsinjoroj estas unu, kiu volas murdi vin kaj li planas fari la krimon morgaŭ.

— De kie vi scias tion? – demandis la reĝo.

— En la manĝejon ĉiu venis sen armiloj, sed li kunhavas ponardon.

La reĝo tuj kontroligis la invititajn grandsinjorojn kaj efektive ĉe unu grandsinjoro estis trovita la armilo. Krome li provis fuĝi, sed la soldatoj kaptis lin. Fine li konfesis sian fiplanon.

— Nu, kokino vi ekzameniĝis bonege. Via dommastrino meritas ne nur cent orojn, sed ŝi povos loĝi kun vi en la fortikaĵo ĝis ŝi deziras. Ŝi vivos, kiel sinjorino kaj en la estonto ŝi ne devos suferi pro la malsato.

Ĉiu ĝojegis al la bona novaĵo, precipe la virino, ĉar ŝi ne devis forlasi sian karan kokinon.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

— Onklo Adalberto —

Iluzio

Iluzio